

## *La Parabolo de la Urbo Magie Farita*

### 妙法蓮華經化城喻品第七

trad. **Kiuiĉi Nohara**, Japanio

Je la antikva tempo, bikŝuoj bonzoj, en la estinteco, antaŭ nekalkuleblaj, pli ol nekalkuleblaj, sennombraj, nepripenseblaj kalpoj<sup>1</sup>, en la mondo Sambhava<sup>2</sup>, en la epoko Maharupa<sup>3</sup>, aperis en la mondo Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Sufiĉeposedanto-de-sciento-kaj-konduto-Sugato-Mondoscikonanto-Plejsuperulo-Homdisciplinisto-Instruanto-de-dioj-kaj-homoj-Budho-Sinjorego nomata Mahabiĝnjaĝnjanabibuo<sup>4</sup>. Nu, bikŝuoj, kiom longatempe antaŭe tiu Tathagato estis? Supozu, bikŝuoj, ke iu homo dispulvorigas tuton da terelemento trovebla en nia tuta universo, li prenas unu pulvoreron, kaj iras orienten trans mil mondojn, kaj denove ĝin metas; kaj tiel pluen ĝis ĉiuj pulvoreroj estas elspezitaj en la orienta direkto. Kion, bikŝuoj, vi pensas, ĉu estos eble ke ni per kalkulado mezurus la limon de tiuj mondoj? - Responde ili diris: Certe ne, Sinjorego, certe ne, Sugato. La Sinjorego diris: Bikŝuoj, la limon de tiuj mondoj, kie oni metis pulvoreron, kaj kie oni ne metis ĝin, povas kalkuti matematikisto, aŭ matematika majstro; sed estas neeble kalkuladi la limon de tiuj cent mil miliardoj da kalpoj per aplikado de matematika regulo. Tiom longega, tiom nepripensebla, tiom senmezura nombro da kalpoj jam forpasis de post la estingiĝo de la Sinjorego Tathagato Abiĝnjaĝnjanabibuo; sed, bikŝuoj, mi rememoras dank' al scio kaj vido de Tathagato, tiun Tathagaton, kiu estingiĝis tiom longatempe antaŭe, kvazaŭ li estus estingiĝinta hodiaŭ aŭ hieraŭ.

Tiam la Sinjorego donis jenajn versaĵojn: -

1. Mi rememoras la Plejhonoran el homoj,  
Kiu estis antaŭ multaj kalpodekmilionoj,  
Sanktegulo Abiĝnjaĝnjanabibuo,  
La plej supera Ĝino de la tempo.
2. Por parolik parabole, -

---

<sup>1</sup> 劫. vidu S.V. ("Sukhavativjuho" de la sama tradukinto)

<sup>2</sup> origino: Kun-esti. 好成;集有

<sup>3</sup> Granda formo. 大相;大色

<sup>4</sup> maha=granda; abhijña=povoscio; jñana=saĝo; abhibu=supera. Granda-Povoscio-Saĝo-Superanto. 大通智勝如来

- Iu dispulvorigas la tutan universon;  
 Prenante unu el la pulvoreeroj,  
 Li iras trans mil mondojn kaj ĝin metas.
3. Li metas la duan kaj la trian,  
 Kaj tiel pluen, kun tuta amasego da pulvoreroj  
 Ĝis ĉiuj pulvoreroj elspeziĝas,  
 Kvazaŭ la universo estus malplena.
  4. Supermezura estas la terelemento,  
 Kiu konsistigas tiujn mondojn;  
 Dispecigu ĝin en pulvorerojn,  
 Kaj mi komparas ilin al la kalpoj pasintaj.
  5. Supermezura estas la nombro de kalpodekmilionoj,  
 Depost estingiĝo de la Sugato;  
 Esprimi ne povas eĉ tutaĵo de la pulvoreroj,  
 Tiom multege da kalpoj jam forpasis.
  6. Tiun Gvidanton kiu tiel longe antaŭe estingiĝis,  
 Kaj ĉiujn ŝravakojn kaj bodhisatvojn<sup>5</sup>.  
 Mi memoras kvazaŭ estus hodiaŭ aŭ hieraŭ.  
 Tia estas scio de la Tathagato.
  7. Do, bikŝuoj, vi devas kompreni  
 Ke senlima estas scio de la Tathagato.  
 Mi scias pro memoro preciza kaj sendifekta  
 Ĉion, kio okazis antaŭ multaj kalpocentoj.

Kaj, bikŝuoj, vivodaŭro de Tathagato Mahabiĝnjaĝnjanabibuo, la Arhato-Plenvekiĝinto estis kvindekkvar centmil miliardoj da kalpodekmilionoj.

En la komenco, kiam Tathagato Mahabiĝnjaĝnjanabibuo, la Sinjorego ankoraŭ ne atingis la plejsuperan plenvekiĝecon, kaj ĵus eksidis sur la supro de la teraso de vekiĝeco, li venkis kaj forbatis armeon da diablojtentantoj<sup>6</sup>; kaj poste li diris al si: Mi devas atingi la plejsuperan vekiĝecon. Sed ankoraŭ la Dharmoj ne prezentiĝis al li. Li restadis sur la teraso de vekiĝeco ĉe l' piedo de bodhiarbo en la daŭro de unu mezkalpo. Li restadis tie en la daŭro de la dua mezkalpo; sed ankoraŭ li ne atingis la plejsuperan vekiĝecon. Li restadis dum la tria, kvara, kvina, sesa, sepa, oka, naŭa kaj deka mezkalpoj sur la teraso de vekiĝeco ĉe l' piedo de la bodhiarbo, ĉiam sidante sur la krucigitaj kruroj, kaj neniam stariĝante. Li restadis kun firma menso kaj senmova, senskua korpo, sed la Dharmoj ankoraŭ ne prezentiĝis antaŭ li.

Kaj, bikŝuoj, kiam la Sinjorego estis ĉe la supro de la teraso de vekiĝeco, la dioj el la mondo Tridektrio<sup>7</sup> pretigis por li tronon de la Granda Leono kun alteco de centmil

---

<sup>5</sup> vidu S.M.P. ("Samanta Mukha Parivarto" de la sama tradukinto.)

<sup>6</sup> sans. Mâra. 魔

<sup>7</sup> sans. Trâyastrimśas

joĝanoj<sup>8</sup>. La Sinjorego ĝin okupis, kaj atingis la plejsuperan plenvekiĝecon. Kaj ĵus kiam la Sinjorego ekokupis la terason de vekigeco, la diidoj Braĥmokorpaj pluvigis pluvon da floroj sur la teraso cent joĝanojn ĉirkaŭe, kaj la vento, kiun ili blovigis en la ĉielo forblovis velkintajn florojn. De la komenco de la florpluvado, kiam la Sinjorego sidis sur la teraso de vekigeco, ili pluvigis ĝin seninterrompe en la daŭro de tuta dek mezkalpoj, por superverŝi la Sinjoregon; kaj tiel same ili daŭrigis pluvigi florpluvon ĝis kompleta estingigo de la Sinjorego. Kaj diidoj sub la Kvar Dioj-Gardistoj de la Mondo frapadis ĉielajn tamburojn; ili frapadis seninterrompe por honoro de la Sinjorego ĉe la supro de teraso. Ekde la tempo, kiam la Sinjorego ekokupis la terason ĝis la momento de la kompleta estingiĝo, en la daŭro de tuta dek mezkalpoj seninterrompe ili surludis ĉielajn muzikilojn.

Kaj, bikŝuoj, post forpaso de dek mezkalpoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo atingis la plejsuperan plenvekiĝecon. Tion tuj aŭdis dek ses filoj, kiuj naskiĝis al li, kiam li estis ankoraŭ reĝido-heredonto, kaj el kiuj, la plej aĝa estis nomata Ĝnjanakaro<sup>9</sup>. Tiuj dek ses principoj, bikŝuoj, havis diversajn, belajn ludilojn, per kiuj ili povas ĝui ludadon. Tiam, bikŝuoj, tiuj dek ses principoj forlasis la diversajn ludilojn - ĉar ili eksciis ke la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo atingis la plejsuperan plenvekiĝecon, - kaj venis tien, kie estis la Sinjorego. Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo, ĉirkaŭataj kaj servataj de patrinoj kaj nutristinoj plorantaj, kaj ankaŭ de la honora, riĉega Reĝo Ĉakravartino<sup>10</sup>, ministroj kaj centmil miliardoj da dekmilionoj da vivanto. Ili venis por honori, respekti, adori, reverenci la Sinjoregon; ili salutis la Sinjoregon ĉe la piedoj, kun siaj kapoj, trifoje ĉirkaŭiris ĉirkaŭ la Sinjorego dekstren, levis la kunmetatajn manojn, laŭdis la Sinjoregon vizaĝ-al-vizaĝe per jenaj versaĵoj: -

8. Granda kuracisto estas vi kiun neniu superas,  
Kaj kiun klerigis la senfinaj kalpoj;  
Por savi ĉiujn vivantojn,  
Hodiaŭ vi plenumis la bonvolan deziron.
9. Malfacilegan aferon vi elfaris,  
En la daŭro de l' dek kalpoj ĵus pasintaj,  
Dume vi sidadis senmove,  
Neniam movetante korpon, manon, piedon, nek iun parton.
10. Trankvila estis via menso, kaj firmeza,  
Neniam movetanta, neniom ŝancelebla,  
En vi estis neniu disiĝo;  
Vi restis absolute kvieta kaj sendifekta.
11. Feliĉa estas vi! Ĉar tiel bonŝance, tiel sendanĝere,

---

<sup>8</sup> v. S.V.

<sup>9</sup> Amasigo de saĝo. 智積, 智藏

<sup>10</sup> 轉輪王, v. S.M.P.

- Vi atingis la plej superan plenvekiĝecon.  
 Pro tio ankaŭ vni estas benataj;  
 Ni gratulas nin, ho Leono el homoj!
12. Kvazaŭ blinduloj kun neniu gvidanto<sup>11</sup>  
 La vivantoj senĝojaj ĉiam suferadas.  
 Sed sciante trovi vojon al la fino de sufero,  
 Ili neniam penas por liberiĝo.
13. Malbenitaj estaĵoj ĉiam pliiĝas en ĉiama nokto;  
 Ĉiuj Dharmoj estas forrabitaj el ĉielaj korpoj;  
 Vortoj de la ĝino ne aŭdiĝas; -  
 Kaj la mondo subiras en profundan malhelon.
14. Sed hodiaŭ vi mondoscikonanto atingis lokon,  
 Sanktegan, superegan, kaj sendifektan;  
 Favorataj estas ni kaj la tuta mondo,  
 Kaj alproksimiĝas por serĉi rifuĝejon en vi, ho Protektanto!

Kaj, bikŝuoj, post kiam la dek ses principoj, infanecaj kaj junaj, verse laŭdis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhaton-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon, vizaĝ-al-vizaĝe, ili petegis al la Sinjorego ke li turnu<sup>12</sup> la Dharman Radon, dirante: Prediku, Sinjorego, la Dharmon, prediku, Sugato, la Dharmon, por bono de vivantaro, por feliĉo de vivantaro, pro kompato al la mondo, por profito, bono kaj feliĉo de homoj kaj dioj. Kaj tiam ili donis jenajn versaĵojn: -

15. Prediku Dharmon, ho posedanto de la cent bonaj signoj!  
 Ho Gvidanto, senkompara Saĝegulo!  
 Vi ricevis la bonegan, superan scion;  
 Per ĝi lumigu la mondon inkluzive de dioj.
16. Savu nin kaj ĉiujn vivantojn,  
 Malkaŝu la scion de la Tathagato,  
 Por ke ni - kaj ankaŭ ĉiuj vivantoj -  
 Same ricevu la superan Vekiĝecon.
17. Vi scias ĉiujn agojn kaj sciojn;  
 Vi scias karakteron kaj bonon en antaŭa ekzisto,  
 Vi scias kapablon de ĉiuj vivantoj: -  
 Turnu do la plej superan radon.

Kaj kiam, bikŝuoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo atingis la plej superan plenan vekiĝecon, tiam kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj en ĉiu el la dek direktoj tremis en ses manieroj,

---

<sup>11</sup> sans. Anâyika, kiun vorton Nanjio-Izumi kaj Kern tradukis per “malfeliĉa”, sed Kumaraĝiva legis: “anâyaka”. Mi sekvis Kumaraĝiva’n.

<sup>12</sup> Turni Dharma Radon = prediki

kaj estis limigitaj de granda lumo; kaj tiuj malgajaj, malhelaj lokoj, kiuj kuŝas en la interspaco de tiuj mondoj, kaj kie eĉ la suno kaj luno, - tiel potencaj, tiel grandaj, tiel brilaj, - ne povas lumigi per sia lumo, nek briligigi siajn kolorojn kaj brilojn, - eĉ tiaj lokoj tiam estis lumigitaj de la la granda lumo. Kaj tiuj vivantoj, kreigitaj en la interspacaj lokoj, rigardis unu la alian, eksciis ekziston unu de la alia. - Jen ankaŭ aliaj estaĵoj kreigitaj ĉi tie! - Kaj palacoj kaj aeraj ĉaroj de ĉiuj dioj en ĉiuj tiuj mondoj ĝis la mondo de braĥmoj tremis en ses manieroj, kaj lumis en granda lumo superanta la gloron de la dioj. Tiamaiere, bikŝuoj, granda tertremo kaj apero de granda lumo okazis samtempe.

Tiam en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj en la orienta regiono, aerĉaroj de ĉiuj braĥmoj eksterordinare eklumis, lumegis kaj brilegis grandioze kaj belege. Kaj, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj diris al si: Kion antaŭdiras ĉi tiuj aerĉaroj, kiuj tiel eksterordinare eklumas, lumegas kaj brilegas grandioze kaj belege? Tiam, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj iris al la loĝejoj unu de la aliaj, kaj komunikis la aferon unu al la aliaj. Tiukaze, bikŝuoj, granda braĥmo, nomata Sarvasatvatratrion<sup>13</sup> alparolis al la braĥmaro per jenaj versaĵoj: -

18. Hodiaŭ niaj ĉaroj brilas,  
Kun senkompara, ŝatinda lumo,  
Kaj donas ĝojon per beleco kaj heleco.  
Kio estas la kaŭzo?
19. Esploru ni do pri la afero,  
Ĉu iu diido ekaperis,  
Kaj dank' al ties povo okazas ĉi tie  
Tia neniam antaŭe vidita fenomeno?
20. Aŭ ĉu povas esti ke ie en la mondo  
Naskiĝis Budho, reĝo de reĝoj,  
Kaj tion sciigas tiu signo,  
Ke ĉiuj regionoj en dek direktoj lumas belege?

Kaj tiam, bikŝuoj, ĉiuj grandaj braĥmoj el la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj eniris en siajn aerĉarojn, prenis kun si sanktajn sakojn, tiom grandajn, kiom la monto Sumeru, kun ĉielaj floroj, trairis la regionojn en la kvar direktoj unu post la alia, ĝis fine alvenis al la okcidenta regiono, kie haltis la grandaj braĥmoj, kaj vidis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhaton-Plenvekiĝinton Abiĝnjaĝnjanabibuon, ĉe la supro de la granda teraso de Vekiĝeco, sidantan sur la leona trono, ĉe la piedo de la bodhiarbo, ĉirkaŭtatan kaj servatan de dioj, drakoj, jakŝoj, gandharvoj, asuroj, garudoj, kimnaroj, serpentegoj kaj homoj-nehomoj<sup>14</sup>, ĵus kiam liaj dek ses junaj principoj estis petantaj al li, ke li rulu la Dharman Radon. Ili vidis, kaj venis tien, kie la Sinjorego sidas. Tie ili venis, kaj salutis lin ĉe la piedoj per la kapo, ĉirkaŭiris

---

<sup>13</sup> Ĉiuj-estaĵoj-savo 救一切有情

<sup>14</sup> Pri ĉi tie citataj estaĵoj, v. S.M.P.

dekstren ĉirkaŭ la Sinjorego multcentmil fojojn, disfalis florojn sur lin kaj sur la bodhiarbon, dek joĝanojn ĉirkaŭe, el la florsakoj, tiom grandaj kiom la monto Sumeru. Kaj tiam ili dediĉis siajn aerĉarojn al la Sinjorego, dirante: Akceptu, Sinjorego, niajn aerĉarojn pro kompato por ni; uzu, Sugato, niajn aerĉarojn pro kompato por ni.

Tiuokaze, bikŝuoj, post kiam la braĥmoj dediĉis la aerĉarojn al la Sinjorego, ili diris vizaĝ-al-vizaĝe al Sinjorego en versaĵoj kiel jene: -

21. Ĝino ekaperis en la mondo,  
Mirinda kaj senkompara, tiel bonfarema kaj kompatema.  
Vi naskiĝis kiel protektanto, instruanto kaj mastro;  
Hodiaŭ favorataj estas ĉiuj regionoj en la dek direktoj.
22. Ni estas venintaj  
De trans kvindek mil dekmilionoj da mondoj,  
Por saluti Ĝinon,  
Forlasante niajn belegajn palacojn.
23. Pro ago de nia antaŭa ekzisto,  
Ni havas ĉi tiun brilajn aerĉarojn;  
Akceptu ilin pro kompato por ni,  
Kaj uzu laŭplace, ho Mondoscikonanto!

Tiam, bikŝuoj, post kiam la braĥmoj verse laŭdis la Sinjoregon, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon vizaĝ-al-vizaĝe, ili petis al li, dirante: "Turnu, Sinjorego, la Dharman Radon; turnu, Sugato, la Dharman Radon en la mondo; prediku, Sinjorego, la Dharmon al la mondo, inkluzive de dioj, asuroj, braĥmoj, al ĉiuj popoloj, inkluzive de asketoj, braĥmanoj, dioj, homoj, kaj asuroj, por feliĉo de vivantoj pro kompato por la mondo, por la bonstato de la popolo, por feliĉo de homoj kaj dioj.

Tiam, bikŝuoj, tiuj kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj braĥmoj diris al la Sinjorego unuvoĉe en ĥoro per versaĵoj kiel jene: -

24. Prediku, Sinjorego, la Dharmon,  
Predikku, la Plejhonora el homoj!  
Manifestigu vian povon de boneco,  
Kaj savu ĉiujn superantajn vivantojn!
25. Kvazaŭ floro de la udumbaro<sup>15</sup>,  
Maloftaĵo estas la lumo de la mondo.  
Venis vi, ho granda heroo,  
Al vi, Tathagato, ni preĝas!<sup>16</sup>

---

<sup>15</sup> Fabela kreskaĵo, kiu nur unufoje por trimil jaroj floras. 優曇波羅, 優曇鉢華, 優曇華, 靈瑞華

<sup>16</sup> Ĉi tiu stanco malestas en la ĉina teksto.

Tiam, bikŝuoj, la Sinjorego sileente donis konsenton al la braĥmoj.

Kaj tiam, bikŝuoj, en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj en la sudorienta regiono, aerĉaroj de ĉiuj braĥmoj eksterordinare eklumis, lumegis kaj brilegis grandioze kaj belege. Kaj, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj diris al si: Kion antaŭdiras ĉi tiuj aerĉaroj, kiuj tiel eksterordinare eklumas, lumegas kaj brilegas grandioze kaj belege! Tiam, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj iris al la loĝejoj unu de la aliaj, kaj komunikis la aferon unu al la aliaj. Tiuokaze, bikŝuoj, granda braĥmo, nomata Adhimatrakaruniko<sup>17</sup> alparolis al la braĥmaro per jenaj versaĵoj: -

26. Sinjoroj, kia antaŭsigno estas tio,  
Kion ni vidas hodiaŭ?  
Kion antaŭdiras la aerĉaroj,  
Kiuj brilas en eksterordinara lumo!
27. Ĉu ne (antaŭvidigas) ĉi tio  
Ke iu diido-virtulo venas ĉi tien,  
Kaj dank' al lia povo  
Ĉiuj aerĉaroj brilas?
28. Aŭ povas esti, ke iu Budho, Plejhonora el Homoj  
Ekaperis ĉi tie en la mondo,  
Kaj dank' al lia povo,  
Niaj aerĉaroj estiĝas tia, kian ni vidas?
29. Do esploru ni ĉiuj kune;  
Malgrava ne povas esti la kaŭzo;  
Ĉar tian (mirindan) antaŭsignon  
Neniam antaŭe ni vidis.
30. Antaŭen ni iru ĉiudirekten,  
Kaj vizitu dekmilionajn regnojn;  
Sendube nun ekaperis Budho,  
Ĉi tie en la mondo.

Tiam, bikŝuoj, ĉiuj grandaj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj eniris en siajn aerĉarojn, prenis kun si sanktajn sakojn, tiom grandajn, kiom la monto Sumeru, kun ĉielaj floroj, trairis la regionojn en kvar direktoj, unu post la alia, ĝis fine alvenis al la nordokcidenta regiono, kie haltis la grandaj braĥmoj, kaj vidis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhaton-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon, ĉe la supro de la granda teraso de Vekiĝeco, sidantan sur la leona trono, ĉe la piedo de la bodhiarbo, ĉirkaŭatan kaj servatan de dioj, drakoj, jakŝoj, gandharvoj, asuroj, garudoj, kimnaroj, serpentegoj kaj homoj-nehomoj, ĵus kiam liaj dek ses junaj principidoj estis petantaj al li, ke li turnu la Dharman Radon. Ili vidis, kaj venis tien, kie la Sinjorego sidas. Tie ili venis, kaj salutis lin, ĉe la pidedoj per la kapo, ĉirkaŭiris dekstren ĉirkaŭ la Sonjorego multecentmil fojojn, disfalis florojn sur lin, kaj sur la

---

<sup>17</sup> La ege kompatema. 大悲, 最慈愛

bodhiarbon, dek joĝanojn ĉirkaŭe, el la florsakoj, tiom grandaj, kiom la monto Sumeru. Kaj tiam ili dediĉis siajn aerĉarojn al la Sinjoreo, (dirante): Akceptu, Sinjorego, niajn aerĉarojn pro komapto por ni, uzu, Sugato niajn aerĉarojn pro komapto por ni.

Tiuokaze, bikŝuoj, post ke la braĥmoj dediĉis la aerĉarojn al la Sinjorego, ili diris vizaĝ-al-vizaĝe al la Sinjorego, en versaĵoj kiel jene: -

31. Adorkliniĝon al la senkompara Saĝegulo,  
Dio de dioj, belvoĉa kvazaŭ la kalavinko!<sup>18</sup>  
Gvidanto de la mondo, inkluzive de dioj,  
Amanto, kompatanto de la mondo, ni vin salutas!
32. Kiel eksterordinare estas, Sinjorego,  
Ke vi post tiel longe ekaperas en la mondo!  
En la plena daŭro de okdekcent kalpoj,  
Budho malestis ĉi tie en nia Mondo.
33. En la plena daŭro de okdekcent kalpoj,  
Neniam troviĝis plej honora el Homoj  
Infero pli grandiĝis por ĉiam,  
Kaj degeneris la ĉielaj estaĵoj.
34. Pro nia bona ago, tamen,  
Li nun ekaperis en la mondo,  
Li, okulo nia, rifuĝejo, protektanto, patro,  
Dharma reĝo, amanto kaj kompatanto!

Tiam, bikŝuoj, post ke la braĥmoj verse laŭdis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhaton-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon, vizaĝ-al-vizaĝe, ili petis al la Sinjorego, dirante: Turnu, Sinjorego, la Dharman Radon; turnu, Sugato, la Dharman Radon en la mondo; prediku, Sinjorego, la Dharmon al la mondo, iniluzive de dioj, asuroj, braĥmoj, al ĉiuj popoloj, inkluzive de asketoj, braĥmanoj, dioj, homoj kaj asuroj por feliĉo de vivantoj, pro komapto por la mondo, por la bonstato de la popolo, por feliĉo de homoj kaj dioj.

Tiam, bikŝuoj, tiuj kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj braĥmoj diris al la Sinjorego unuvoĉe en ĥoro per versaĵoj kiel jene: -

35. Rulu, Sanktegulo, la superan Radon;  
Malkaŝu la Dharmon en la regionoj ĉe ĉiuj direktoj;  
Liberigu suferantajn vivantojn;  
Havigu al mortemuloj ĝojon kaj feliĉon.
36. Aŭdinte la Dharmon, ili ricevu Vekiĝecon,  
Kaj atingu la vojon de dioj.

---

<sup>18</sup> Nomo de belkanta birdo. Vortaristo identigas ĝin kun pasero; sed kion signifas per “belvoĉa pasero”?! Kern tradukis ĝin per “lark”. En ĉinlingvaj tekstoj, iu nur transliteris ĝin per 迦陵頻伽, kaj alia trafe tradukin per 鸞, kiu estas fabla birdo.



Forlasinte la korpon de asuroj,  
Ĉiuj estu en paco, en elportado kaj en konsolo.

Tiam, bikŝuoj, la Sinjorego silente donis konsenton al la braĥmoj.

Kaj tiam, bikŝuoj, en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj en la suda regiono, aerĉaroj de ĉiuj braĥmoj eksterordinare eklumis, lumegis kaj brilegis grandioze kaj belege. Kaj, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj diris al si: Kion antaŭdiras ĉi tiuj aerĉaroj, kiuj tiel eksterordinare eklumas, lumegas kaj brilegas grandioze kaj belege? Tiam, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj iris al la loĝejoj unu de la aliaj, kaj komunikis la aferon unu al la aliaj. Tiuokaze, bikŝuoj, granda braĥmo, nomata Sudharmo<sup>19</sup> alparolis al la braĥmaro per jenaj versaĵoj: -

37. Senkaŭze ne povas esti, Sinjoroj,  
Ke hodiaŭ niaj aerĉaroj tiel brilas.  
Certe io eksterordinara okazis ie en la mondo,  
Do ni esploru la aferon bone.
38. Neniam ekaperis tia antaŭsigno,  
De antaŭ centoj da kalpoj.  
Eble iu diido naskiĝis,  
Aŭ Budho venis en la mondon.

Tiam, bikŝuoj, ĉiuj grandaj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj eniris en siajn aerĉarojn, prenis kun si sanktajn sakojn, tiom grandajn, kiom la monto Sumeru, kun ĉielaj floroj, trairis la regionojn en la kvar direktoj unu post la alia, ĝis fine alvenis al la norda regiono, kie haltis la grandaj braĥmoj, kaj vidis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhaton-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon, ĉe la supro de la granda teraso de Vekiĝeco, sidantan sur la leona trono, ĉe la piedo de la bodhiarbo, ĉirkaŭatan kaj servatan de dioj, drakoj, jakŝoj, gandharvoj, asuroj, garudoj, kimnaroj, serpentegoj kaj homoj-nehomoj, ĵus kiam liaj dek ses junaj principoj estis petantaj al li, ke li rulu la Dharman Radon. Ili vidis, kaj venis tien, kie la Sinjorego sidas. Tie ili venis, kaj salutis lin ĉe la piedoj per la kapo, ĉirkaŭiris dekstren ĉirkaŭ la Sinjorego multecentmil fojojn, disfalis florojn sur lin kaj sur la bodhiarbon dek joĝanojn ĉirkaŭe, el la florsakoj, tiom grandaj, kiom la monto Sumeru. Kaj tiam ili dediĉis siajn aerĉarojn al la Sinjorego, (dirante): Akceptu, Sinjorego, niajn aerĉarojn pro kompato por ni; uzu, Sugato, niajn aerĉarojn pro kompato por ni.

Tiuokaze, bikŝuoj, post ke la braĥmoj dediĉis la aerĉarojn al la Sinjorego, ili diris vizaĝ-al-vizaĝe al la Sinjorego en versaĵoj kiel jene: -

39. Malfacile estas vidi Gvidanton;  
Bonvenon al la forigonto de mondeca deziro!  
Post tiel longatempem, nun vi aperas en la mondo,

---

<sup>19</sup> Bona leĝo. 妙法, 善法

- Post plendaŭro de cent kalpoj ni vidas vin.
40. Refreŝigu, Sinjorego de la mondo, la vivantojn soifantajn.  
Unuan fojon vi venis; nefacile estas vin vidi.  
Kvazaŭ floras la udumbaro,  
Maloŝte aperas vi, la Gvidanto.
41. Niaj aerĉaroj hodiaŭ brilas,  
Pro via povo, Gvidanto, tiel eksterordinare  
Elmontru vian favoron,  
Kaj akceptu ilin, vi, kies vido penetras ĉion.

Kaj tiam, bikŝuoj, post ke la braĥmoj verse laŭdis la Sinjoregon, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon vizaĝ-al-vizaĝe, ili petegis al li, dirante: Turnu, Sinjorego, la Dharman Radon; Turnu, Sugato, la Dharman Radon en la mondo; prediku, Sinjorego, la Nirvanon; liberigu, Sinjorego, la vivantojn; favoru, Sinjorego, la mondon. Prediku, Sinjorego, la Dharmon por la mondo, inkluzive de dioj, asuroj kaj braĥmoj; al ĉiuj popoloj, inkluzive de asketoj, braĥmanoj, dioj, homoj kaj asuroj, por la feliĉo de la vivantoj, pro kompato por la mondo, por bonstato de la popolo, por feliĉo de la homoj kaj dioj.

Tiam, bikŝuoj, tuj kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj braĥmoj diris al la Sinjorego unuvoĉe en Horo per la versaĵoj kiel jene: -

42. Prediku la Dharmon, Sinjorego-Gvidanto,  
Rulu la Radon de Dharmo!  
Frapadu la tamburon de Dharmo!  
Blovadu la konkaĵon de Dharmo!
43. Surverŝu la pluvon de Dharmo sur la mondo,  
Prediku la belsonan predikaĵon;  
Elmontru la Dharmon, kiun ni bezonas;  
Savu mirad-dekmilionojn da vivantoj!

Tiam, bikŝuoj, la Sinjorego silente donis konsenton al la braĥmoj.

Ripetado: Same pri la sudokcidenta regiono; same pri la okcidenta regiono; same pri la nordokcidenta regiono; same pri la norda regiono; same pri la nordorienta regiono; same pri la malsupra regiono.

Tiam, bikŝuoj, en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj en la supra regiono, aerĉaroj de ĉiuj braĥmoj eksterordinare eklumis, lumegis kaj brilegis grandioze kaj belege. Kaj, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj diris al si: Kion antaŭdiras ĉi tiuj aerĉaroj, kiuj tiel eksterordinare eklumas, lumegas kaj brilegas grandioze kaj belege? Tiam, bikŝuoj, ĉiuj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj iris al la loĝejoj unu de la aliaj, kaj komunikis la aferon unu al la aliaj. Tiuokaze, bikŝuoj, granda braĥmo, nomata Ŝikhin<sup>20</sup> alparolis al la braĥmaro per jenaj versaĵoj: -

---

<sup>20</sup> Fajro. 尸棄 (羅什)、妙識 (竺法護)、有焰 (南條・泉)

44. Sinjoroj, kio estas la kaŭzo de ĉi tio,  
Ke niaj aerĉaroj tiel bralas?  
En brileco, en koloro, en heleco estas eksterordinare.  
Kio do povas esti la kaŭzo?
45. Nenion similan ni iam vidis,  
Nek priaŭdis antaŭe.  
Tiel belege, tiel glorege ĉi tiuj brilas;  
Kio do povas esti la kaŭzo?
46. Ĉu povas esti ke diido naskiĝis,  
Kiel rekompenco de niaj bonaj agoj,  
Kaj ties povo prezentiĝas tiamaniere,  
Aŭ Budho ekaperis en la mondo?

Tiam, bikŝuoj, ĉiuj grandaj braĥmoj en la kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj mondoj eniris en siajn aerĉarojn, prenis kun si sanktajn sakojn, tiom grandajn, kiom la monto Sumeru, kun ĉielaj floroj, trairis la regionojn en kvar direktoj unu post la alia, ĝis fine alvenis al la malsupra regiono, kie en la malsupra regiono haltis la grandaj braĥmoj, kaj vidis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhatno-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon ĉe la supro de la leona trono, ĉe la piedo de la bodhiarbo, ĉirkaŭatan kaj servatan de dioj, drakoj, jakŝoj, gandharvoj, asuroj, garudoj, kimnaroj, serpentegoj kaj homoj-nehomoj, ĵus kiam liaj dek ses junaj principoj estis petantaj al li, ke li rulu la Dharman Radon. Ili vidis, kaj venis tien, kie la Sinjorego sidas. Tie ili venis, kaj salutis lin, ĉe la piedoj per la kapo, ĉirkaŭiris dekstren ĉirkaŭ la Sinjorego multecentmil fojojn, disfalis florojn sur lin, kaj sur la bodhiarbon, dek joĝanojn ĉirkaŭe, el la florsakoj, tiom grandaj, kiom la monto Sumeru. Kaj tiam ili dediĉis siajn aerĉarojn al la Sinjorego, (dirante): Akceptu, Sinjorego, niajn aerĉarojn pro kompatato por ni; uzu, Sugato, nian aerĉarojn pro kompatato por ni.

Tiuokaze, bikŝuoj, post ke la braĥmoj dediĉis siajn aerĉarojn al la Sinjorego, ili laŭdis la Sinjoregon vizaĝ-al-vizaĝe en versaĵoj kiel jene: -

47. Kiel bone estas ke ni vidas Budhojn,  
Sanktajn Sinjoregojn de la mondo!  
Tiuj Budhoj emancipas ĉiujn vivantojn,  
Kiu restas en la Tri Mondo.
48. Ĉiovidantaj mastroj de la mondo  
Egale vidas ĉiujn regionojn en dek direktoj.  
Malfermante la pordon de senmorto,  
Ili surbordigas homojn sendanĝere.
49. Senmezuraj nombroj da kalpoj pasis,  
Sed ili estis tute malplenaj;  
Ĉiuj regionoj estis ĉiam en mallumo,  
Ĉar ne aperis Ĝino, la mastro.

50. Malgaja infero ĉiam plivastiĝis,  
Kaj la vojoj de la besto kaj asuro.  
Mil dekmilionaj da vivantoj enfaladis  
En la vojon de la demono-malsatulo<sup>21</sup>.
51. Plimalbone fariĝis ĉe la ĉielaj estaĵoj -  
Post morto ili enfalis en la vojon de malbenito.  
Malbonan vojon ili iradis,  
Ĉar ili ne aŭdis la Dharmon de Budho.
52. Ĉiuj vivantoj degeneris en ago, en pureco;  
Degeneris en konduto kaj en kompreno.  
Ili perdis la feliĉon;  
Perdis konscion de la feliĉo.
53. Ili ne observis moralajn regulojn,  
Ĉiam restante en malvera dharmo.  
Ili iradis malbonan vojon,  
Ĉar ili ne estis gvidataj de Sinjorego de la mondo.
54. Post longatempe vi venis,  
Ho, Lumo de la mondo!  
Pro kompato por ĉiuj vivantoj,  
Vi naskiĝis en la mondo.
55. Vidinte ke vi atingis kun sekureco,  
La superan scion de la Budho,  
Ni estas dankemaj antaŭ vi,  
Kaj same la mondo, inkluzive de dioj.
56. Dank' al via potenco, ho granda Sinjoro,  
Brilas miaj aerĉaroj tiel belege.  
Al vi, Granda Heroo, ni ilin dediĉas;  
Bonvolu akcepti ilin, ho Sanktegulo!
57. Bonvolu uzi ilin, ho Gvidanto,  
Per via favoro al ni,  
Por ke ni kaj ĉiuj vivantoj samtempe -  
Atingu la Superan Vekiĝecon!

Kaj tiam, bikŝuoj, post ke la braĥmoj verse laŭdis la Sinjoregon, Tathagaton-Arhaton-Plenvekiĝinton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon vizaĝ-al-vizaĝe, ili petegis al li, dirante: Turnu Sinjorego, la Dharman Radon; turnu, Sugato, la Dharman Radon en la mondo; prediku, Sinjorego, la Nirvanon; liberigu, Sinjorego, la vivantojn, favoru, Sinjorego, la mondon. Prediku, Sinjorego, la Dharmon por la mondo, inkluzive de dioj, asuroj kaj braĥmoj; al ĉiuj popoloj, inkluzive de asketoj, braĥmanoj, dioj, homoj kaj asuroj; por feliĉo de la vivantoj; pro kompato por la mondo; por bonstato de la popolo; por feliĉo de la homoj kaj dioj.

---

<sup>21</sup> sans. *Preta-gati*. 餓鬼道

Tiam, bikŝuoj, tiuj kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj bramoj diris al la Sinjorego unuveĉe en ĥoro per la versaĵoj kiel jene: -

58. Turnu la superan Radon senkomparan;  
Frapu la Tamburon senmortan.  
Emancipu ĉiujn vivantojn el centoj da malbonoj;  
Kaj montru vojon al la Nirvano.
59. Prediku la Dharmon, por kiu ni petegas;  
Favoru nin kaj nian mondon.  
Disaŭdigu la belan, ĉarman voĉon,  
Kiun vi ekzercis dum dekmilionoj da kalpomiloj.

Tiam, bikŝuoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo eksciinte kion petas tiuj kvindek-centmil-miriad-dekmilionaj braĥmoj kaj la dek ses principoj, liaj filoj, baldaŭ komencis turni la grandan Radon de la Dharmo laŭ la trimanieraj turnadoj, kaj dek du detaloj, kiun ne povas turni asketoj, braĥmanoj, dioj, braĥmoj, diabloj-tentantoj kaj ceteroj en la mondo: - ĉi tio estas sufero; ĉi tio estas amasigo de sufero; ĉi tio estas estingado de sufero; ĉi tio estas vojo al estingado de sufero. Kaj plue li pliamplekse malvolvis la Dharmon de la (12) sinsekvaĵoj<sup>22</sup>. - Estas tiel, bikŝuoj. - Al senscio sekvas agoj; al agoj sekvas konscio; al konscio sekvas nomoformo; al nomoformo sekvas ses sentorganoj; al ses sentorganoj sekvas kontakto; al kontakto sekvas sento; al sento sekvas avido; al avido sekvas akiro; al akiro sekvas ekzisto; al ekzisto sekvas naskiĝo; al naskiĝo sekvas maljuniĝo, morto, ĉagraniĝo, malĝojo, doloro, afliktiĝo kaj senkuraĝiĝo. Tiele estas amasigata la tuta serio da mizero. Al estingado de senscio sekvas estingado de agoj; al estingado de agoj sekvas estingado de konscio; al estingado de konscio sekvas estingado de nomoformo; al estingado de nomoformo sekvas estingado de ses sentorganoj; al estingado de ses sentorganoj sekvas estingado de kontakto; al estingado de kontakto sekvas estingado de sento; al estingado de sento sekvas estingado de avido; al estingado de avido sekvas estingado de akiro; al estingado de akiro sekvas estingado de ekzisto; al estingado de ekzisto sekvas estingado de naskiĝo; al estingado de naskiĝo sekvas estingado de maljuniĝo, morto, ĉagreniĝo, malĝojo, doloro, afliktiĝo kaj senkuraĝiĝo. Tiele estas estingota la tuta serio da mizero.

Kaj, bikŝuoj, kiam ĉi tiu Rado de Dharmo estis turnata de la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo, en la mondo, inkluzive de dioj, asuroj kaj braĥmoj, ankaŭ la kunveno de asketoj, braĥmanoj, dioj, homoj kaj asuroj, tiam mensoj de sesdek-centmil-miriad-dekmilionaj vivantoj eĉ momente ne influigis (de ĉiuj aferoj), kaj pro tio ili baldaŭ emancipiĝis de ĉiuj malperfektaĵoj, kaj al si proprigis la tri scikonojn, la ses transcendantajn povojn, la ok emancipojn kaj profundan meditadojn. Kaj, bikŝuoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto

---

<sup>22</sup> sans. *Nidāna*. (十二) 因縁

Mahabiĝnjaĝnjanabibuo predikis sinsekve duan, trian kaj kvaran fojon. Kaj, bikŝuoj, ĉiun fojon, ke la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo predikis, animoj de la vivantoj egalnombraj al la sableroj de la rivero Ganga, multobligita per centmil-miriad-dekmilionoj emancipiĝis de ĉiuj malperfektaĵoj, ĉar ili ne influigis (de ĉiuj aferoj). Depost tiam, bikŝuoj, aro de disĉiploj de la Sinjorego supermezure multobligis.

Tiam, bikŝuoj, la dek ses junaj principoj, plenaj kun fido, forlasis hejmon por vivi asketan vivon, kaj ĉiuj fariĝis ŝramaneroj (novicoj), prudeantaj, kleraj, inteligentaj, piaj, kaj ekzercadis sanktan devon sub multaj centmiloj da Budhoj, celante la plejsuperan plenvekiĝecon. Tiam, bikŝuoj, la dek ses novicoj diris al la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo: Sinjorego, ĉi tiuj multaj centmil-miriad-dekmilionoj da disĉiploj de la Tathagato, per la instruo de la Dharmo de la Sinjorego jam kompletigis la grandan transcendan povoscion, la grandan povon kaj la grandan potencon. Bonvolu do Sinjorego, pro kompato, instrui la Dharmon, koncerne la plejsuperan plenvekiĝecon, por ke ni ankaŭ sekvu al la instruo de la Tathagato. Ni bezonas, Sinjorego la scion kaj vidon de la Tathagato; tion Sinjorego mem povas atesti, ĉar vi, Sinjorego, kiu scias celadon de ĉiuj vivantoj, scias ankaŭ la nian.

Tiam, bikŝuoj, vidinte ke tiuj junaj principoj forlasis hejmon, kaj fariĝis novicoj, okcentmil-miriad-dekmilionaj homoj, aŭ duono da subularo de la reĝo Ĉakravartino forlasis hejmon.

Tiam, bikŝuoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo, kiu komprenis kion la novicoj petegas, ĉe la fino de dudek mil kalpoj, predikis antaŭ la kvar klasoj laŭ la Dharmero nomata Saddharmapundariko, Grandveturila Sutro, kiu estas instruaĵo de ĉiuj Bodhisatvoj kaj favoraĵo de ĉiuj Budhoj. Kaj, bikŝuoj, tiam tiuj dek ses novicoj-principoj akceptis, tenis, ripetis kaj bone komprenis kion la Sinjorego predikis.

Tiam, bikŝuoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo donis al la dek ses novicoj antaŭcertigon pri la plejsupera plenvekiĝeco. Kaj, bikŝuoj, kiam la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo predikis laŭ la Saddharmapundariko, la ŝravakoj kaj la dek ses novicoj ankaŭ estis plenaj de fido; Sed multaj centmil miriad-dekmilionoj da vivantoj havis dubon.

Kaj, bikŝuoj, post ke la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo predikadis laŭ la Dharmero, Saddharmapundariko, en la daŭro de okmil kalpoj senripoze, li eniris en monaĥejon por meditadi. Kaj, bikŝuoj, la Tathagato daŭrigis meditadon en la monaĥejo dum okdek-kvar mil dekmilionaj kalpoj.

Kaj, bikŝuoj, kiam la dek ses novicoj eksciis ke la Sinjorego, Tathagato Mahabiĝnjaĝnjanabibuo restas en meditado, ili sidiĝis sur la leona trono, Dharma seĝo pretigita por ĉiu el ili, respekte salutis la Sinjoregon, Tathagaton Mahabiĝnjaĝnjanabibuon, kaj klarigis la Dharmeron, Saddharmapundarikon por la kvar klasoj en la daŭro de okdek-kvar mil kalpoj. Per tio, bikŝuoj, ĉiu el la novicoj-

bodhisatvoj igin tiom multenombrajn vivantojn, kiom la sableroj de sesdekoble-sesdekcentmil-miriad-dekmilionaj Gangoj, spertaj, komprenemaj, fervoraj, viglaj, ĝojaj kaj certaj pri la plejsupera plenvekiĝeco.

Kaj, bikŝuoj, ĉe la fino de okdekkvarmil dekmilionaj kalpoj, la Sinjorego, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto Mahabiĝnjaĝnjanabibuo ekstaris el la meditado kun plena memoro kaj konscio, kaj poste, li alproksimiĝis al la seĝo de Dharmo, kaj okupis la seĝon pretigitan por li.

Kaj, bikŝuoj, kiam la Sinjorego, Tathagato Mahabiĝnjaĝnjanabibuo sidiĝis sur la seĝo, tiam tuj surrigardante la tutan aŭskltantaron, li alparolis al la bikŝuoj: Bikŝuoj! Ĉi tiuj dek ses novicoj ricevis mirindan kapablon; posedas saĝecon; servadis al multe centmil miriad-dekmilionoj da Budhoj; ekzercadis la sanktan devon; ricevis la scion de la Budho; transdonadis la scion de la Budho; kaj klarigis la scion de la Budho. Bikŝuoj! Servadu al la dek ses novicoj ĉiuokaze. Bikŝuoj, Ĉiuj, kiuj ne malakceptas nek malobeas la predikadon de tiuj filoj de bona familio, ĉu adeptoj de la ŝravaka veturilo, ĉu adeptoj de la pratjekabudha veturilo, ĉu adeptoj de bodhisatva veturilo, - ĉiuj baldaŭ atingos la plejsuperan plenvekiĝecon, kaj ricevos la scion de la Tathagato.

Post tiam, bikŝuoj, la dek ses filoj de bona familio ripete eksplikis la Dharmeron, Saddharmapundarikon, laŭ la instruo de la Sinjorego. Kaj, bikŝuoj, la vivantoj, egalnombraj al la sableroj de sesdekoble-sesdekcentmil-miriad-dekmilionaj Gangoj, kiuj jam bone komprenis la vojon al la vekiĝeco, per ĉiu bodhisatvo el la dek ses novicoj-bodhisatvoj, sekvadis en ĉiuj siaj naskiĝoj al ilia ekzemplo, kaj forlasis hejmon, vidis ilin, kaj aŭdis la Dharmon el iliaj buŝoj. Ili konsolis kvardek mil dekmilionojn da Budhoj, kaj iuj el ili faras same ĝis hodiaŭ.

Bikŝuoj, mi anoncas al vi jenon: La dek ses principoj-junuloj, kiuj laŭ la instruo de la Sinjorego fariĝis novicoj kaj predikantoj de la Dharmo, atingis la plejsuperan plenvekiĝecon, restas, ekzistas, kaj travivas ĝis nun, en Budhaj regnoj ĉe la dek direktoj, predikas la Dharmon al multe centmil miriad-dekmilionoj da ŝravakoj kaj bodhisavoj. Nome: -

En la oriento, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Akŝobjo<sup>23</sup>, en la mondo Abiratio<sup>24</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Merukuto<sup>25</sup>.

En la sudoriento, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Simhagoŝo<sup>26</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Simhavaĝa<sup>27</sup>.

En la sudo, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata

---

<sup>23</sup> Sen-Tremo. 阿閼, 無怒, 無動

<sup>24</sup> Mondo de Ĝuo. 歡喜国

<sup>25</sup> Supro-de-Meru. 須弥頂

<sup>26</sup> Leon-kriado. 獅子音

<sup>27</sup> Leon-insigno. 獅子相 (幢)

Akaŝapratistito<sup>28</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Nitjaparinirvrito<sup>29</sup>.

En la sudokcidento, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Indravaĝo<sup>30</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Braĥmavaĝo<sup>31</sup>.

En la okcidento, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Amitabo<sup>32</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Sarvalokadhatupadravodvegapatjuttirno<sup>33</sup>.

En la nordokcidento, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Tamalapatraĉandanagandhabiĝnjo<sup>34</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Merukalpo<sup>35</sup>.

En la nordo, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Megasvaro<sup>36</sup>, kaj Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Megasvararaĝo<sup>37</sup>.

En la nordoriento, bikŝuoj, estas Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Sarvalokabajastambitatvavidvamsakara<sup>38</sup>; kaj, dekse, bikŝuoj, mi, Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto nomata Ŝakjamunio, kiu meze de la mondo Saho atingis la plejsuperan plenvekiĝecon.

Kaj, bikŝuoj, kiam ni estis novicoj sub la instruo de la Sinjorego, tiam estis centmil miriad-dekmilionoj da vivantoj, tiom multenombraj kiom sableroj de la rivero Gango, kiuj aŭdis la Dharmon de ĉiu bodhisatvo el ni, kaj ĉiun el kiuj ni kondukadis en la plejsuperan plenvekiĝecon. Kaj, bikŝuoj, ili restas ĝis nun ĉe la grado de la ŝravako, kaj maturiĝas je la plejsupera plenvekiĝeco. Ili atingos la plejsuperan plenvekiĝecon iom post iom, ĉar, bikŝuoj, penetri la scion de la Tathagato estas malfacile. Kaj, bikŝuoj, kiuj estas tiuj centmil miriad-dekmilionaj<sup>39</sup> vivantoj, sennombraj, nekalkuleblaj, kiel sableroj de la rivero Gango, kiuj tiam de mi aŭdis la Dharmon, kiam mi estis bodhisatvo sub la instruo de la Sinjorego? -

---

<sup>28</sup> La vakuo restado. 虚空住

<sup>29</sup> Ĉiama estingo. 常滅

<sup>30</sup> Indra insigno. 帝相 (幢)

<sup>31</sup> Braĥma insigno. 梵相 (幢)

<sup>32</sup> Nemezurebla lumo. 阿弥陀, 無量光

<sup>33</sup> Ĉiuj(n) mondoj(n) (el ĝiaj) doloroj (kaj) suferoj savpk. 度一切世界苦惱

<sup>34</sup> Tamàra-attra = folio de tamalarbo; ĉandana-gandha =odoro de la sandalarbo; ablaĝña = povoscio transcenda. 多摩羅跋 (葉) 梅檀香神通

<sup>35</sup> Meru-simila. 須弥相

<sup>36</sup> Nubo-bruo. 雲音 (? 雲自在)

<sup>37</sup> Nubo-bruo-reĝo. 雲自在王, 雲音王

<sup>38</sup> (de) Ĉiuj-mondo(timo)-subpremi-detruu. 壞世間一切怖畏

<sup>39</sup> sans. Guhyaka, unu el la duondiecaj estaĵoj. (? *verŝajne Nohara erare metis tiun ĉi piednoton, ĉar en la teksto ne troviĝas adekvata vorto.* - Yamaguti S.)



Bikŝuoj, vi estis tiam tiuj vivantoj.

Kaj en estonteco, post mia kompleta estingiĝo, ili fariĝos ŝravakoj, kaj aŭdos pri la sankta devo de la bodhisatvo, ne konsciante ke ili estas bodhisatvoj. Kaj bikŝuoj, ili ĉiuj atingos la Nirvanon, havante la ideon de la Nirvano. Kaj plie, bikŝuoj, ĉar mi restas en aliaj mondoj en diversaj nomoj, ili ankaŭ tie renaskiĝos, kaj serĉante la scion de la Tathagato, aŭdos la doktrinon: La Nirvano de la Tathagato estas nur unu, krom ĝi ekzistas neniu dua Nirvano de la Tathagato. Bikŝuoj, oni devas scii ke tio estas taktiko de la Tathagato, kaj rimedo por instruado de la Dharmo. Kiam la Tathagato, bikŝuoj, ekscias ke la tempo de lia estingiĝo venas, kaj vidas ke la eklezio estas pura, firma en fido, komprenanta la doktrinon de vakuismo, okupiĝanta en meditado, en profunda meditado, tiam, bikŝuoj, la Tathagato, vidante ke estas siatempe, kunvenigas ĉiujn bodhisatvojn kaj ŝravakojn, kaj predikos jenon: Bikŝuoj, ekzistas en la mondo neniu dua veturilo, neniu dua Nirvano, multe pli certe ne la tria. Tio estas lerta taktiko de la Tathagato-Arhato, ke li instruas al la vivantoj tian Nirvanon, kian ili povas akcepti, ĉar li vidas ke ili estas profunde erarintaj en la vojo de perdiĝo, enfalintaj en la ŝlimo de deziro, kaj kontentaj kun malgranda dharmo.

Por priparoli parabole, bikŝuoj, supozu ke estas densa arbarego, etendiĝanta je kvincent joĝanojn, en kiun venis granda aro da homoj. Ili havas gvidanton, kiu kondukas ilin en la vojaĝo al la insulo de juvelo, kiu (gvidanto), kapabla, sagaca, kaj saĝa, bone scias malfacilecon de trapasi la arbaregon kaj volas konduki la karavanon ekster la arbaregon. Tiam la granda aro da homoj, laciĝintaj, senfortiĝintaj, timigataj kaj maltrankvilaj, diras: "Vere, mastro, gvidanto kaj kondukanto, vi scias ke ni estas laciĝintaj, senfortiĝintaj, timigataj kaj maltrankvilaj; returnenirigu nin, ĉar la arbarego etendiĝas tiel malproksimen." Tiam, bikŝoj, la gvidanto, lerta pri taktiko diras al si: "Estus kompatinde ke ĉi tiuj viantoj ne alvenus al la granda insulo de juvelo"; kaj pro kompatito por ili, li uzas taktikon: - En la mezo de la arbarego, li magie faras urbegon, etendiĝantan je cent aŭ ducent aŭ tricent joĝanoj. Kaj poste li diras al ili: "Ne timu, sinjoroj, ne returneniru; jen estas granda urbo, kie vi povas ripozi kaj fari kion ajn vi devas fari; do restu tie; kaj ĝuu ripozon. Kaj poste, kiuj volas, tiuj iru antaŭen al la insulo de juvelo."

Tiam, bikŝuoj, la homoj, kiuj estas en la arbaro, miras pri la eksterordinaĵo, kaj pensas: "Ni estas jam ekster la arbarego; ni restadu ĉi tie en ripozo." Tiam, bikŝuoj, la homoj eniras en la magie faritan urbon, kaj pensante kvazaŭ ili estus jam alvenantaj al la celata loko kaj savataj, ili pensas: "Ni estas en ripozo; ni estas jam refreŝiĝintaj." Tiam la gvidanto vidinte ke ili ne estas plu lacaj, malaperigas la magie faritan urbon, kaj diras al ili: "Nu, sinjoroj, la insulo de juvelo estas proksime; ĉi tiun urbon mi faris nur por doni al vi ripozeton."

Tiel same, bikŝuoj, la Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto estas gvidanto por vi kaj ĉiuj vivantoj. Verdire, bikŝuoj, la Tathagato-Arhato-Plenvekiĝinto pensas: "Granda estas arbaro da malbonaj pasioj, kiun ili devas trapasi, forlasi, eviti. Sed ne lasu la vivantojn subite sin turni posten, kiam ili aŭdas pri unu sola Budha Veturilo, kaj ĉesi antaŭeniradon, ĉar ili povas pensi, ke la Budha vojo estus trairebla nur per tro malfacilaj klopodoj." La Tathagato scikonas malfortencon de la vivantoj, kaj kiel la

gvidanto magie faris la urbon por ripozo de la vivantoj, kaj post kiam ili estis ripozintaj, li sciigis al ili ke ĝi estis magie farita urbo, -- tiel same, bikŝuoj, la Tathagato-Arhatto-Plenvekiĝinto, por doni al la vivantoj ripozon, uzas lertan taktikon, kaj montras kaj predikas du staciojn al la Nirvano: la stacio de la ŝvavako, kaj de la pratjekabudho. Kaj, bikŝuoj, kiam la vivantoj haltas tie, la Tathagato-Arhatto-Plenvekiĝinto predikas al ili: "Bikŝuoj, vi ankoraŭ ne plenumas vian taskon, nek elfaras kion vi devas. Sed vidu! bikŝuoj, la Budha scio estas proksime; vidu kaj penu por ĝi. Kion vi preanas kiel Nirvanon, tio ne estas la Nirvano." Tio estas, bikŝuoj, la lerta taktiko de la Tathagato-Arhatto-Plenvekiĝinto, ke li predikas la tri Veturilojn.

Tiam, por ekspliki la saman temon pli detale, la Sinjorego donis jenajn versaĵojn: -

60. Abiĝnaĝnjanabibuo, Gvidanto de l' mondo,  
Okuptadis la terason de Vekiĝeco;  
Sed li ne atingis la Vekiĝecon por dek mezkalpoj,  
Kvankam li vidis la aferon en ĝia unua senco.
61. Dioj, drakoj, asuroj, kaj mistikuloj<sup>40</sup>,  
Fervore honorantaj la Ĝinon,  
Pluvigis pluvon da floroj  
Sur la ejo de Vekiĝo de l' Gvidanto.
62. Tamburon ili frapadis alte en la ĉielo,  
Por adorsaluti kaj honori la Ĝinon:  
Maltrankvilaj estis ili, ĉar li prokrastis tiom longe  
La plej altan lokon atingi.
63. Post forpaso de dek mezkalpoj,  
Sinjorego Anabibuo atingis Vekiĝecon.  
Dioj, homoj, serpentegoj kaj asuroj,  
Ĉiuj estis ĝojaj kaj feliĉegaj.
64. Estis dek ses junaj princidoj,  
Herooj, virtaj filoj de la Gvidanto de homoj.  
Ĉi tiuj venis kun mil dekmilionoj da vivantoj,  
Por adorsaluti la Plejhonoran el homoj.
65. Salutinte la Sinjoregon ĉe la piedoj,  
Ili petegis: Prediku la Dharmon:  
Savu nin kaj la mondon,  
Per bonega parolo, ho Leono el reĝoj!
66. Nur post longatempe, la Granda Gvidanto aperis  
En la dek regionoj de la mondo;  
Ĉaroj de braĥmoj brilis,  
Por doni signon al ĉiuj vivantoj.
67. En la regiono orienta,

---

<sup>40</sup> Sans. Guhyaka, unu el la duondiecaj estaĵoj.

- Kvindek dekmilionoj da kampoj ekstremis,  
Altaj braĥmaj ĉaroj tie  
Brilege ja helege.
1. La signon vidis la braĥmoj,  
Alproksimiĝis al la Ĉefgvidanto de l' mondo.  
Pluvigis sur lin pluvon da floroj,  
Kaj donacis ĉiuj siajn ĉarojn.
  2. Ili petegis antaŭen turni la Radon de Dharmo,  
Lin laŭdintre per versaĵoj kaj kantado.  
Sed la reĝo de reĝoj silentis, ĉar li pensis:  
Mia tempo prediki ankoraŭ ne venas.
  3. Same en la sudo, okcidento kaj nordo,  
En la malsupro, en la supro,  
Kaj ankaŭ en la interdirektaj regionoj  
Estis mil dekmilionoj da braĥmoj.
  4. Al la Sinjorego ili pluvigis florojn,  
Salutis lin ĉe la piedoj,  
Donacis ĉiuj siajn ĉarojn,  
Laŭdis lin kaj ripete petegis:
  5. Antaŭen turnu la Radon, ho vi kun senlima vido:  
kiun malofte ni renkontas en multaj kalpo-dekmilionoj:  
Manifestu kompatemon, kiun vi havas de antaŭe,  
Kaj malfermu la pordon de senmorto.
  6. Aŭdinte la peton, li, kun senlima vido,  
Elmontris diversforman Dharmon:  
Eksplikis la kvar Verojn, ĝenerale:  
Kaj instruis pri la sinsekvaj kaŭzoj de l' ekzisto.
  7. Ekde senscio ĝis morto, senlima doloro,  
Predikis la Saĝulo: -  
De naskiĝo devenas ĉiuj malbonoj:  
Sciu ke la homo estas destinita por morto.
  8. Kiam li eksplikis la Dharmojn  
Multformajn, diversajn, senlimajn,  
Okdek miriad-dekmilionoj da vivantoj aŭdintaj  
Baldaŭ atingis la stacion de ŝravako.
  9. En la dua okazo ankaŭ,  
Kiam la Ĝino eksplikis multajn Dharmojn,  
Tiel multenombraj vivantoj, kiel la Gangaj sableroj,  
Puriĝis kaj baldaŭ fariĝis ŝravakoj.
  10. Depost la sama momento,  
Sekvantaro de l' Gvidanto estis sennombra,  
Tiel ke ni ne povas finnombri  
Eĉ en la daŭro de miriadoj da kalpodekmilionoj.

11. Tiuj dek ses principoj, liaj karaj filoj,  
Kiu forlasis hejmon, kaj fariĝis novicoj,  
Ankaŭ petegis al la Ĝino:  
Prediku, ho Gvidanto, la Superan Dharmon,
12. Por ke ni ankaŭ fariĝu samaj kun vi,  
La plejsupera el Ĝinoj, Komprenanto de l' mondo,  
Por ke ĉiuj vivantoj fariĝu samaj kun vi,  
La heroo, la posedanto de pura vido.
13. Pripensante la deziron de siaj filoj, junaj principoj,  
La Ĝino eksplikadis al ili  
La plejsuperan Vekiĝecon  
Per miriad-dekmilionoj da paraboloj.
14. Eksplikante per miloj da rezonadoj,  
Kaj elmonrante la scion de la transcendaĵoj,  
Instruadis la Sinjorego de la mondo  
La veran Vojon laŭirotan de bodhisatvoj.
15. Ĉi tiun sutron de granda amplekso,  
La Saddharmapundarikon donis la Sinjorego,  
Per miloj da versaĵoj,  
Tiel multenombraj kiel sableroj de Gango.
16. Fineksplikinte ĉi tiun sutron,  
Eniris la Ĝino en sian meditejon;  
En la plena daŭro de okdek kvar kalpoj,  
Sidadis la Sinjorego en la sama loko por meditado.
17. Eksciante la novicoj ke la Sinjorego  
Ne elvenas de la meditejo,  
Instruadis al dek milionoj da vivantoj,  
la scion de la Budho, scion puran, sendifektan.
18. Ĉi tiun sutron ili instruadis,  
Laŭ instrukcio de tiama Sugato.  
El la seĝo, preparita po unu al ĉiu. --  
Same estis taskite al mi.
19. Instruiĝis tiel multe da vivantoj,  
Kiel sableroj de sesdek mil Gangoj;  
Ĉiu el la filoj de la Sugato  
Kondukadis tiel multe da vivantoj.
20. Post kompleta estingiĝo de la Ĝino,  
Ili ekiris por vidi dekmilionajn Budhojn;  
Ili honorige servadis al la Plejhonora el homoj,  
Kaj al liaj disĉiploj kune.
21. Observante la grandan, noblan devon,  
Kaj atingante la Vekiĝecon en la dek regionoj,  
La dek ses filoj de la Ĝino fariĝis Ĝinoj,

- Duope en ĉiuj horizontaj direktoj.
22. Ĉiuj, kiuj aŭskultadis al ili,  
Fariĝis ŝravakoj sub la Ĝinoj,  
Ricevinte la Vekiĝecon iom post iom,  
Dank' al multe da lertaj rimedoj.
  23. Mi mem estis unu el ili,  
Al kiu vi ĉiuj tiam aŭskultadis;  
Tial ankaŭ nun vi estas miaj disĉiploj,  
Kondkotaj al la Vekeĝeco per la lerta rimedo.
  24. Tio estas la kaŭzo el antikva tempo,  
Pro kio mi eksplikadas la Dharmon,  
kaj kondukadas vin al la Supera Vekiĝeco.  
tia estas la afero, do, bikŝuoj, ne timu.
  25. Por paroli parabole, estas arbarego,  
Malproksima, senhoma, kun neniuj rifuĝejoj,  
Plena de sovaĝaj bestoj, akvomanka,  
Ja timeginda al sentaŭguloj.
  26. Tien venas miloj da homoj,  
Tiun arbaregon trapasi,  
Arbaregon, kiu estas tute senhoma  
Kaj etendiĝanta je kvincent ĵoĝanoj.
  27. Homo gvidas la trapasantaron  
Tra la senhoma arbarego,  
Riĉegulo li estas, kaj prudentulo, inteligentulo,  
Havanta riĉan scion kaj sperton.
  28. Tiam ili diras al la gvidanto:  
Ni estas laciĝintaj, mastro,  
kaj plu ne povas antaŭeniri;  
Ni devas nun returneniri.
  29. Sed la gvidanto, inteligenta kaj prudenta,  
Elpensante lertan rimedon, diras al si:  
Ve al la malsaĝuloj, kiuj volas returneniri,  
kaj tute perdi la akirtajn maltekostaĵojn!
  30. Per mia transcenda povo, tamen,  
Magie mi faru urbegon;  
Mil dekmilionoj da domoj estu ornamitaj,  
Monaĥejoj kaj parkoj estu belege konstruataj.
  31. Magie mi faru lagetojn kaj riverojn;  
Floroj kaj ĝardenoj ĝin ornamu;  
Muroj kaj pordegoj ĝin ĉirkaŭu,  
Kaj en ĝi sennombraj homoj loĝadu.
  32. Magie farinte la urbegon, li diras al ili:  
Ne timu, sed estu ĝojaj;

- Ĉar vi atingis belegan urbon,  
Eniru en ĝin kaj okupiĝu je via afero.
33. Estu gajaj kaj trankvilaj;  
Tutan arbaron vi jam trapenetris.  
Tiele li diras por doni ripozeton,  
Kaj efektive ili refreŝiĝis de laco.
34. Eksciinte ke ili sufiĉe ripozis,  
Li kunvenigas ilin kaj diras denove:  
Venu kaj aŭskultu kion mi diras, --  
Ĉi tiun urbegon mi faris magie.
35. Mi vidis vin laciĝintajn,  
Kaj, ĉar mi ne volas ke vi returneniru,  
Mi uzis rimedon de mia lerta taktiko. --  
Rapudu nun por la insulo.
36. Samsence, bikŝuoj, mi estas gvidanto,  
Kondukanto de mil dekmilionoj da vivantoj,  
Mi vidas ĉiujn vivantojn suferantajn,  
Ne povante eliĝi el ovŝelo de turmentaĵo.
37. Tiam mi pensas en mi:  
Tiuj vivantoj jam ripozis kaj trankviliĝis;  
Nun rekonigu ilin pri ĉiuj suferoj, (kaj diru):  
Vian celon vi atingos ĉe l' stacio de Arhato.
38. Kiam vi estos atingita la stacion,  
Kiam mi trovos vin ĉiujn Artatoj,  
Tiam mi kunvokos vin ĉiujn,  
Por instrui al vi Dharmon en ĝia vera senco.
39. Estas lerta taktiko de la Gvidanto,  
ke Saĝeguloj montras tri Veturilojn;  
Efektive ekzistas unu sola Vetrurilo, sed ne la dua;  
La du estas pridiritaj por doni ripozon.
40. Tial mi diras al vi, bikŝuoj,  
Klopodu tutpove por scio de Ĉioscianto;  
Ĉar ĝis nun ankoraŭ vi ne atingis tien,  
Kie vi ricevas la kompletan Nirvanon.
41. Kiam vi proprigos al vi scion de Ĉioscianto,  
Kaj la dek povojn de la Ĝino,  
Budhoj vi povos fariĝi, kun tridek du noblaj signoj,  
kaj tiam unue vi havos la veran Nirvanon.
42. Jen estas instrumaniero de la Gvidanto:  
Por doni ripozeton li pridiris Nirvanon.  
Post ripozeto, tamen, -- ĉar tio ne estas lasta ripozejo --  
Li kondukadas al la scio de Ĉioscianto.